

# Sekso kaj Egaleco

Numero 12

Aprilo 1983

Sendependa  
novaĵletero

## NOVAĴOJ

En la lasta numero de SkE, mi klarigis, kial ĝi ne aperis de du jaroj: interalie pro la nasko de mia filo, Gabrielo, en la fino de 1982. Nun mi povas fiere anonci la naskon de dua filo, Fabiano, en februaro. Kiel vi rimarkas, ĉi-foje mi sukcesis malfrui nur je du monatoj anstataŭ du jaroj.

Rigardante la amasiĝintan materialon de du jaroj, mi facile povis konstati, kiu temo ĉiam restas proksima al la koro de la esperantistoj. Mi trovis minimume tri sufiĉe longajn artikolojn pri la pronomoj kaj sufiksoj. Eble kelkaj el vi partoprenas la opinion de Marie Bartovská en Ĉeĥoslovakujo; ŝi sendis al mi poŝtkarton, en kiu ŝi komparis la tutan diskuton kun la mezepokaj disputoj pri la nombro da anĝeloj, kiuj povas stari sur la pinto de pinglo. Sed, laŭ la kvanto da leteroj kaj artikoloj, kiujn mi ricevadas pri la lingva demando, por la plimulto ĝi retenas sian fascinon. Do, ni senhonte plu debatu! En ĉi tiu numero vi trovas la kontribuon de Claude Piron pri tiu temo.

Lasta novaĵo: finfine okazas la prezaltiĝo kiun mi minacis en la antaŭa numero. Eskapas nur la usonanoj, por kiuj la abonkosto eĉ malaltiĝas, kaj la japanoj, por kiuj ĝi restas sama. Post pena horo da kalkuletoj en la margenoj de malnova ĵurnalo (infanoj ne nur malhelpas redakti revuojn; ili ankaŭ rompas poŝkalkulilojn), mi triumfe aperigas la liston de novaj tarifoj en la interna kovrilo.

Anna Brennan

# Sekso kaj Egaleco

## Redaktoro

Anna Brennan  
Colle Rasto  
I-00039 Zagarolo  
Italujo

**Sendependa novaĵletero**

Jarabono (4 numeroj)  
16 ned. gld. aŭ 15 irk.

Internaciajn respondkuponojn  
sendu rekte al Anna Brennan, aŭ  
pagu al ŝia nederlanda poŝtĉek-  
konto, n-ro 4412211.

Kunlaborantoj en ĉi tiu numero

Brian Holser  
Hukunaga Makiko  
Lembe Laanest  
Dermod Quirke  
Yamakawa Setuko

## Perantoj

Internacia (prezo: 16 ned. gld.): Universala Esperanto-Asocio,  
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Poŝtĉekkonto  
378964 (UEA). Banko: Mees & Hoop, Coolsingel 93, 3012 EA Rotterdam  
(konto 25.52.89.804).

Argentina: Hugo A. Lingua, Casilla de Correo 278, 2000 Rosario.

Brita (prezo: £4,00): Dermod Quirke, P.O. Box 14, Newark, Notts.  
NG24 4TP. Poŝtĉekkonto 12 463 0006.

Franca (prezo: 45 Ff.): Anne Elise Amblès, 20 bis rue Censier,  
F-75005 Paris.

Germana (prezo DM 14): VEJGA, Töpferstrasse 20, 4500 Osnabrück.

Itala (prezo: 9000 liroj): Anna Brennan, Colle Rasto, 00039  
Zagarolo. (Nur por italaj abonantoj: aliaj prefere pagu al ŝia  
nederlanda poŝtĉekkonto, aŭ al nacia peranto.)

Japana (prezo: 1500 enoj): Sei to Byodo Hakkokai, p/a Hukunaga  
Makiko, Saginuma 1-10-5, Miyamae-ku, Kawasaki-si, 213. Poŝta  
ĝirkonto 0-99911, Tôkyô.

Nederlanda (prezo: 16 gld.): Anna Brennan. Nederlanda poŝtĉek-  
konto 4412211.

Norvega: Margrete Landmark, Torødveien 109, 3135 Torød. Poŝtĉek-  
konto 5 73 61 29.

Novzelanda: J.T. Allan, 12 Lonsdale Crescent, Wellington 3.

Sveda (prezo: 40 kr.): Märtha Andréasson, 2265 Tolsered, 425 90  
Hisingskär. Poŝtĉekkonto 27 01 05-4880.

Usona (prezo \$5,00): Charles Power, 755 Cedar Ave., Long Beach CA  
90813.

# Internacia Virina Tago

Ĉi tiu materialo pri Internacia Virina Tago estis komisiita de la Komisiono de UEA pri Virina Agado. La celo estis fari el ĝi libreton pri la festado de Internacia Virina Tago tra la mondo. Bedaŭrinde, kolektinte la materialon, mi ne sukcesis prepari ĝin dum sufiĉe longa tempo! Tial legantoj konstatos, ke kelkaj el la artikoloj estas tre malaktualaj. Tiuj, kiuj rilatas al difinita jaro, priskribas la okazaĵojn de 1982. Sed ĉar la festado de IVT ne fundamente ŝanĝiĝis post tiu dato, mi tamen aperigas la tuton, kun multaj pardonpetoj al la kontribuintoj pro la prokrasto.

Mi bedaŭras informi, ke intertempe mortis unu el la ĉefaj kontribuintoj, Rajna Konstantinova, en aŭgusto 1983. ab

## KIAL JE LA 8a DE MARTO?

Ne plu estas klare, ĝuste kial la dato 8a de marto estis elektita kiel Internacia Virina Tago. De pluraj fontoj mi ricevis fragmentojn de la historio de tiu tago. Sajne, nuntempe restas nur pecetoj de la kompleta bildo.

Ĝenerale, la historioj komenciĝas en la sama punkto: en 1857, kiam laboristinoj en la tekso- kaj vesto-fabrikaj de Nov-Jorko manifestaciis en la stratoj de la urbejo, protestante pro siaj teruraj labor-kondiĉoj. Laŭ kelkaj fontoj, tiu manifestacio okazis je la 8a de marto; laŭ alia, la dato rilatas al striko de laboristinoj en la usona urbo Ĉikago en 1909.

Je la 28a de februaro 1909, virinaj membroj de la usona socialisma partio manifestaciis favore al la virina voĉdonrajto. La postan jaron ili jam rekonis la lastan dimanĉon de februaro kiel „Virinan Tagon”.

Inter ĉiuj informetoj kaj fragmentoj, elstaras unu evento: la Dua Internacia Konferenco de Socialismaj Virinoj en 1910 en Kopenhago. La fama germana aganto Klara Zetkin [cetkin] faris proponon pri Internacia Virina Tago, kiu estis unuanime akceptita. Tiam la dato ankoraŭ ne estis fiksita je la 8a de marto. Dum multaj jaroj usonaj virinoj daŭre festis ĝin je la lasta dimanĉo de februaro, dum en diversaj eŭropaj landoj ĝi okazis je la 19a de marto. Ne estas klare, kiam la dato estis ŝanĝita al la 8a de marto.

Dum la Unua Mondmilito, multaj nacioj ĉesis observi la tagon, sed en Usono la virina movado plifortiĝis. Oni uzis la tagon por protesti kontraŭ milito kaj militismo.

En Rusujo oni unue observis IVT en 1913. Sekvis serio de militemaj Virinaj Tagoj, kiu kulminis en 1917; kiam eksplodis ribeloj pro manko de manĝaĵoj, strikoj, kaj amasaj manifestacioj de virinoj. Post la Revolucio, IVT iĝis oficiala festotago en Sovet-Unio.

En Ĉinujo, oni unuafoje observis la tagon en 1924. La virinoj postulis ne nur egalajn rajtojn en laboro, edukado kaj politiko, sed ankaŭ finon al la edzino de infanoj, poligamio, kromedzinoj kaj prostituiteco.

## KAJ NUNTEMPE?

### Aŭstrujo

La virina tago estas ĉie solene festata - ankaŭ en nia lando Aŭstrio. En multaj kunvenoj ĉi-jare oni festis kaj manifestaciis. Tiu tago estis ĉefe destinata al la pac-kampanjoj por malarmado, kaj subskribo de la Linz-apelacio kontraŭ lokado de planitaj mezdistancaj raketoj en Eŭropo. Sed ankaŭ aliaj postuloj estis aŭdeblaj: plibonigo de la vivkondiĉoj por virinoj, instalo de komunikaj centroj, kontraŭ privilegioj por politikistoj. En multaj urboj okazis manifestacioj kaj virinaj mitingoj.

### Bulgarujo

Kortuŝan bildon prezentas nia ĉefurbo Sofio ĉiujare je la 7a kaj la 8a de marto: la stratoj estas plenaj de rapide marŝantaj viroj, infanoj kaj virinoj, kun bukedetoj enmane, ĉu pli modestaj aŭ pli pompaj, sed ĉiuj kun la sama amo destinitaj por la virino - patrino, edzino, fratino, filino, amatino aŭ simple amikino... Apenaŭ estas en tiu tago viro, kiu ne aĉetis florojn por iu virino. Apenaŭ estas virino, kiu ne ricevis florojn je la 8a de marto. Sed ankaŭ oni apenaŭ pensas kial la virinoj ricevas florojn je la 8a de marto. Oni scias nur, ke la virino, kiu donacas al la mondo la vivon, gardas kaj daŭrigas la homan genton, je tiu tago havas sian feston.

.....

Ekde 1944 en Bulgario oni komencis festi oficiale la 8an de marto. Okaze de la Internacia Tago de la Virino en ĉiuj fabrikoj, lernejoj, institutoj kaj aliaj laborejoj, okazas solenaj kunvenoj. Oni legas raportojn, estas literatura kaj muzika programo. Poste la tuta kolektivo dancas, ridas, amuziĝas ktp. La virinoj ricevas donacojn, florojn. En nia lando je la 8a de marto la virinoj iras al sia laborloko. Tie la partia kaj sindikata estraro gratulas ilin. Tiun tagon oni liberigas ilin de laboro kaj ili ricevas donacojn. En ĉiuj urboj, en ĉiuj kvartaloj, same okazas kunvenoj kaj solenaĵoj.

Same oni festas la 8an de marto en Hungario kaj Ĉeĥoslovakio, kie okazas similaj celebroy.

## FR Germanujo

Okaze de la Internacia Virina Tago en 1982 protestis miloj da virinoj en diversaj urboj de la federacia respubliko. Ili kontraŭis la tradicion dominadon de la viroj, la kontraŭvirinan medicinon kaj la intencojn devigi virinojn fari civilan militservon. En Frankfurto oni komencis kolekti subskribojn por tiamaniere argumenti ĉe la registaro.

## Jugoslavio

Ĉe ni la festo jam perdis la karakteron de batalo. La virinoj nun postulas, ke ne nur la 8an de marto sed ankaŭ en ĉiuj 365 tagoj de la jaro oni respektu ilin kaj ilian laboron. Sed nun la viroj batalas por egalrajteco. Ili jam multon atingis. Viro rajtas havi liberajn tagojn pro malsano de infano. Eĉ post la nasko de la infano la geedzoj povas mem decidi, kiu volas resti hejme.

## Pollando

Nun iomete oni pli modeste ĝin festas, kio ja estas komprenebla, konsiderante la krizon ĉi-lande. Malgraŭ tio, tamen la virinoj laborantaj estas honorataj de la estroj kaj ĝenerale de kolegoj per floroj aŭ oni regalas per kuketoj kaj kafo. En mia oficejo, antaŭe, la sindikatoj kun la estraro donacis al ĉiuj laborantaj kaj emeritaj virinoj iujn praktikajn aĵojn, rememoraĵojn, kiel ekz. florvazojn, tablotuketojn, tasetojn ktp. Krome, aranĝita estis solena renkontiĝo kun la ĉefestroj, kiuj disdonis diplomojn al la plej longe laborantaj virinoj kaj monan sumon aldone al la distingo.

Ankaŭ en familioj disvastiĝis la kutimo laŭ kiu la viroj kaj infanoj gratulas la virinojn okaze de ilia tago. Ili donacas floron aŭ la infanoj donas mem-desegnitajn karteton k.s.

.....

Precipe la 7an de marto, jam la florvendejoj estas pretaj por vendi la florojn, kaj estas skribite: „Floreto por Eva“. Dum tiu tago kaj la 8a de marto, plejparte aĉetadas la florojn nur VIROJ!!! Krome en diversaj vendejoj de juveloj, kosmetikaĵoj kaj aliaj memoraĵoj, plejparte troviĝas aĉetantaj viroj. Kompreneble, ili aĉetas malgrandajn aŭ pli valorajn donacojn por siaj edzinoj, amikinoj ktp; sed floron ĉiuj virinoj kaj virinetoj en la hejmo ricevas - de siaj edzo, patro, avo ktp.

Ankaŭ dum la 8a de marto, ĉiuj viroj hejme kaj en la oficejoj aŭ entreprenoj klopodas esti tre ĝentilaj, faras la virinajn laborojn dum tiu tago, por ke la edzino aŭ alia virino dum tiu tago ĝuu vere sian liberecon.

En entreprenoj, lernejoj kaj diversaj oficejoj, la viroj kune kun la direktoro, ĉefo, eventuale reprezentanto de la sindikato, vizitadas ĉiujn

Ĉambrojn, kie laboras la virinoj. Jam tre frue matene antaŭ la laborkomenco estas floroj en ĉiuj Ĉambroj kaj belaj bondezirkartoj. Poste, tiu vira delegacio persone bondeziras al ni sukceson, sanon kaj ĉion bonan sur ĉiu laborkampo kaj private hejme.

Ĉiuj virinoj en la entreprenoj (mi rakontas plejparte pri mia entrepreno, en kiu mi laboris dum 25 jaroj) ricevas dum bonaj tempoj belajn kaj utilajn donacojn. Unu horon pli frue ni rajtis fini nian laboron, por partopreni distran posttagmezon kun kaftrinkado kaj kuko, kelkfoje glaso da vino. Kompreneble, tiam ni virinoj afable invitis ĉiujn kolegojn kaj direktorojn kaj ĉefojn festi kun ni. Ofte, ni ricevas senpagajn biletojn por teatraĵo aŭ koncerto. Ĝis vespero, ni virinoj festas kaj klopodas regali niajn kolegojn, amikojn kaj la edzon, avon hejme.

## Sovet-Unio

Virina Tago estas oficiala ŝtata festo, libera tago. La antaŭan tagon dum solena kunveno gvidantoj de entreprenoj gratulas ĉiujn virinojn ĝenerale kaj honorigas plej elstarajn virinojn per floroj, honordiplomoj, kelkfoje eĉ premioj. Neoficiale, t.e. ne dum la ĝenerala kunveno, vir-kolegoj donacas al siaj koleginoj florojn, dolĉaĵojn, kaj oni trovas liberan tempon por trinki kafon aŭ teon kaj iom babili. En kelkaj kolektivoj vespere estas vera festo, bankedo aŭ dancvespero, sed plej ofte oni pasigas tiun vesperon hejme. La sekvantan tagon ordinare viroj penas esti pli atentemaj kaj helpemaj ol normale; ofte oni akceptas gastojn aŭ gastas mem. Ĉar en nia lando nun ne ekzistas speciala patrina tago, la 8a de marto estas ankaŭ Patrino Tago kun ĉio ligita: floroj, memfaritaj donacoj kaj gratulkartetoj de la infanoj. Kompreneble, pri virinoj kaj patrinoj parolas televido, radio, gazetaro. Ĝenerale ne estas iuj tute specialaj tradicioj.

.....

Nia sovetia Virina Tago estas la tago de unueco kaj solidareco de virinoj de la tuta mondo je la batalo por paco. Sovietian virinon oni solenas ne nur pro tio, ke ŝi estas patrino, ne nur pro ŝia ĉarmeco, sed ŝin oni solenas kiel egalrajtan, aktivan kunlaborantinon en konstruado de nova senklasa socio.

Post la Oktobra Revolucio virina egalrajteco estis leĝe fiksita. En ĉiuj sferoj de la socio la virino brile montras sian kapablon kaj aktive plenumas tutpopolan programon.

Ne estis facile konfirmi virinan egalrajtecon, precipe en orientaj respublikoj kaj en mia regiono, Baŝkirio. Aktivulinojn murdadis siaj patroj, edzoj, fratoj, kiujn provokadis fanatikaj mulaĵoj. Sed la virinoj ĉion venkis. Nun iame senrajtaj virinoj en Baŝkirio ankaŭ elvenis sur la larĝa viva vojo.

La 8a de marto estas tre gaja, tre vigla festo, ĉar ĝi estas la tago de patrino, avinjo, edzinjo, fratino ktp. Ĉiuj sekrete preparas siajn donacojn kaj surprizojn. Ĝi estas la okazo de konspiro kontraŭ la patrino. Infanoj preparas siajn manfaritajn donacojn, kuradas kun patroj al la magazenoj, etaj infanoj deklamas, duonvoĉe provludas. Konspiro ĉie!

Patrinoj ankaŭ bakas, kuiras plej bongustajn manĝaĵojn. Multe da homoj festas hejme, multe da homoj festas kun infanoj en pupteatro, en cirko, en teatro ktp.

.....

Ekde 1966 la 8a de marto ne estas labortago; ĝi estas oficiala festo en Sovetunio.

En Moskvo en la ĉefa teatro kaj Kremlo (kaj simile en aliaj urboj en Sovetio) okazas solenaj kunsidoj, en kiuj partoprenas aktivaj virinoj, kiuj distingiĝis en la laboro: sciencistoj, kuracistoj, pedagogoj kaj aliaj.

En ĉiuj entrepenejoj okazas solenaj kunvenoj, kie oni kuraĝigas la plej bonajn aktivulinojn. Al ili oni donas diplomojn kaj multekostajn donacojn ktp. Poste estas koncerto.

En tiu tago la viroj donas al la virinoj florojn kaj donacojn. En la lernejo kaj la infangardeno oni preparas donacojn por la patrino kaj avinoj.

## Usono

Dum la pasintaj kvin jaroj Internacia Virina Tago iĝis vaste festata tago ĉe la plimulto da virinaj organizaĵoj kaj grupoj. Kunvenoj, seminarioj, podiaj diskutoj, konferencoj, radio-programoj, televidaj prezentoj kaj lernejaj programoj ĉiuj estis parto de la ĉi-jara festado de la rajtoj de virinoj kaj ilia kontribuado al la mondaj historio kaj kulturo.

.....

Dum la 30aj jaroj la observo de Virina tago en Usono preskaŭ malaperis, kaj tiel dormis ĝis la 60aj jaroj, kiam la virina movado subite rekaptis la mesaĝon kaj plifortigis la batalon por egalaj rajtoj en ĉiu aspekto de la virina vivo.

Je la 8a de marto 1978, la Koalicio por Feminisma Agado okazigis kunvenon en San Diego, Kalifornio. Tie amasiĝis virinoj por la Tago, por ke neniu forgesu ke la batalo daŭras.

Hodiaŭ en Usono la batalo kontraŭ diskriminacio ja daŭras - sed la celebroy de Internacia Virina Tago estas iom forlasitaj. Je la 8a de marto nuntempe okazas nur malgrandaj celebroy, kunvenoj, prelegoj ktp. Ĝi certe ne estas tiel populara kiel en la antaŭaj jaroj.

## NE ĈIE FESTATA

La supraj artikoloj donas tre unuecan bildon pri la festado de IVT en Orient-Eŭropo. En komparo, la informoj el la okcidento estas malmultaj kaj nekompletaj. Tio simple spegulas la situacion en la koncernaj landoj, kie IVT estas festata nur de apartaj grupoj. Tial, verŝajne estus oportune aldoni kelkajn klarigojn pri la observado de la tago en okcident-eŭropaj landoj.

IVT ne estas oficiala festotago kaj ĝenerale ne estas konata de la publiko. Lastatempe la naciaj virinaj movadoj komencis utiligi ĝin por kunvenoj, manifestacioj kaj similaj agadoj. Sed certe la tagon ne atingis la gravecon kiun ĝi havas en Orient-Eŭropo.

En 1982 la franca registaro decidis doni pli da atento al Internacia Virina Tago. Prezidento Mitterand invitis 450 famajn kaj nekonatajn virinojn al la prezidenta sidejo, afiŝoj de feministoj aperis en publikaj lokoj, kaj okazis diversaj aliaj celebroy. La virinaj organizaĵoj reagis al ĉio ĉi kun miksitaj sentoj. Kelkaj konsideris ĝin malgravigo de iliaj postuloj: speciala atento en unu tago kaj ignorado dum la aliaj 364. Aliaj ĝojis vidi siajn ideojn akceptitaj kaj publikigitaj.

Eblus argumenti, ke dediĉi al virinoj unu tagon - kiel doni al ili unu paĝon en ĵurnalo - povus signifi: „Ĉi tio estas por vi; la cetero estas por la normalaj homoj (t.e. viroj)“. Sed nuntempe oni pli emas konstati, ke virinoj ankoraŭ havas specialajn bezonojn, kiuj postulas apartan traktadon. Tial la virinaj movadoj transprenis la tagon kiel tagon de agado.

En Italujo, tamen, okazis ĝuste tiu evoluo, kiun la feministoj timis. Ili uzas la 8an de marto por manifestacioj kaj aliaj atentigoj pri la situacio de virinoj. La simbolo de la tago estas la floro mimozo. Kompreneble la florumvendistoj ĝoje kuraĝigas la disdonadon de mimozo, dum la pli serioza parto de la mesaĝo estas perdita. La afero fariĝis tiel ĝenerala, ke eĉ en oficejoj la ĉefoj donas mimozon al la oficistinoj. Feministo diris al mi: „La 8a de marto tute perdis sian karakteron de bataltago. Nun ĝi simple fariĝis alia komerca festo, kiel Patrino Tago kaj Patro Tago. Mi havas la senton, kiam viro donas al mi mimozon, ke mi ŝatus redoni ĝin al li“.

*¶La informojn por ĉi tiu artikolo sendis: Rajna Konstantinova, Maria Taŝeva, Margret Brandenburg, Sonja Tavĉar, Helena Halfar, Lembe Laanest, Galina Galceva, Nina Alekseevna Makarova, Ellie Stein, Marcella Fasani kaj unu anonima kontribuanto. Aldonajn informojn provizis la revuoj Spare Rib (marto 1981), Ms (marto 1982), Internaciisto kaj Women of Europe (n-ro 25).*



# Mia tago

Anita Buswell ♀, Aŭstralio

Ĉiun trian jaron la Asocio de Kampananoj Tutmondaj starigas konkursojn inter siaj membroj. La lasta estis tri-era: 1) desegnado por salutkarto; 2) brodaĵa bildo; 3) eseo milvorta pri "Mia tago". La premiita eseo estis presita en la revuo The Country-woman (La kampanano). Mi juĝis ĝin tradukinda, ĉar leginda ankaŭ de la legantoj de Sekso kaj Egaleco.

ACM

Mia tago estis multfoje promesata al mi kiam mi estis infano. Dum jaroj mi anticipe ĝuis ĝin, kiel la Izraelidoj sian promesitan landon.

Mia patrino furiozigis min oftege dirante: "Via tago alvenos". Kiam mi - apenaŭ ĝisgenue alta laŭ mia memoro - postulis altajn kalkanumojn kaj lipfarbon kiel tiujn de mia plenkreska fratino, patrino ridis kaj diris: "Via tago alvenos".

Kiam mi serpentume skribaĉis sur la murojn de la banĉambro, ĉar mi ne rajtis havi stenografan libron kiel mia fratino, mia patrino ĝin diris malpaciencege, kaj dirante ŝi min manfrapis.

Ambaŭ gepatroj ĝin diradis denove kaj denove kiam mi grimace malridis kaj paŭte postulis ĉevalon propran al mi mem, kiam havis mia granda fratino: "Via tago alvenos".

Do, mi atendadis mian tagon dum laŭŝajne jaregoj.

Ĝi alvenis kompreneble - kaj kun ĝi abrupta elreviĝo. Ĝi estis pagenda! La stenografa libro estis nur la komenca ĉapitro de monatoj da streĉa, obstina studado kaj multnombraj ekzamenoj, antaŭ ol mi akiris mian unuan postenon, kiu ebl-

igis al mi aĉeti altajn kalkanumojn kaj lipfarbon. Mia ĉevalo alvenis kiam mi estis dek-trijara - pli frue ol la stenografa libro - sed kun ĝi alvenis ĉiutaga respondecado. "Se vi deziras tiun ĉevalon, vi ĝin prizorgu!" Matenmanĝon mi ricevis nur post kiam mi manĝigis la ĉevalon, kaj post-tagmezan manĝeton post kiam mi estis ekzercinta kaj enstaliginta ĝin.

Mi estus povinta forfrivoli mian tagon. Mi ja estus ĝin forfrivolinta, sen mia saĝa patrino. Ŝi instruis al mi, ke por fari ĉion kion mi volas fari, por havi ĉion kion mi volas havi, mi devas celkonscie labori. La tempon mi devis organizi. "Neniam diru al mi, ke vi ne havas tempon. Tempo estas la materialo de la vivo. Se vi vivas vi havas tempon." Tial, en miaj adoleskaj jaroj mi lernis ĉiutage fari liston de la tiutagaj farendajoj, aldoni kelkajn horojn por dormado kaj la tuton dividi per dudek kvar.

Mia patrino konis plian diraĵon: "Vi ne estas la sola sablero ĉe la plaĝo". Mi ne ŝatis tion. Mi ja sciis, ke mi ne estas la sola. Mi volis esti nur la plej atentata. Nu - Ŝi forskuis ankaŭ tiun ideon. "Vi ne indas je dua rigardeto ĝis vi unue lernos atenti aliajn."

Tial, kiam mia tago alvenis, mi estis tiom trejnita kiom startopreta atleta. Mi estis respondeca, programita kaj plenkonscia pri la homoj ĉirkaŭ mi. Post kvindek jaroj tiuj trajtoj ankoraŭ restas en mi. Estus same malfacile elradikigi ilin, kiel forigi malsekecon el falanta pluvo.

Mi plenumis plej altrangajn sekretariajn postenojn. En postaj jaroj, pro miaj kapabloj kaj efikeco, mi rajtis mem decidi mian salajron. Ĉiun aferon, kiun mi entreprenis en miaj liberaj horoj, sukcesis, ĉar mi sciis kiel atingi sukceson.

En kio, do, mi eraris? Ĉar mi ja eraris. Malgraŭ mia brila elstareco, mi fuŝis, kaj jen mi finfine, frenezeta maljunulino, tute introvertita.

Mi scias, en kio mi eraris. Sed malofte mi tion agnoskas. Nur foje, kiam mi vidas la korvarmon kaj amon, kiujn elverŝas sur sian bebon juna patrino, aŭ la fieron kaj indulgemon, kiujn elmontras avino al siaj genepoj, tiam io en mia gorĝo eknodigaskaj min preskaŭ sufokas. Tiam mi estas devigata agnoski

(tamen tre sekrete), ke jene mi eraris: mi donis prioritaton al efikeco anstataŭ al homoj.

Sekve mi fine fariĝis neamata kaj nekapabla ami. Mi rigardas min, la idealan komitatano, kiu antaŭenpuŝis ĉiuspecajn aferojn. Ho, jes - mi konsciis pri homoj. Sed mi uzis ilin. Homoj servis miajn interesojn, ne inverse.

Maljuna Nelsono, mia najbaro, pravas. Li ofte venas en mian apartamenton, frapetas per sia bastono sur la plankon kaj diras: "Ĉi tiu damninda ejo neniam aspektas loĝata". Mia loĝejo estas ĉiam tre orda, tre pura. Nelsono postvivas sian edzinon kaj kvar el siaj gefiloj. Lia vivo estis morna, sed li estas varmkora kaj prizorgema. Mi scias, ke li ŝatas min - kaj ankaŭ mi tre ŝatas lin, sed neniam mi konfesus - sed min obsedas ordo kaj tempo, kaj tiuj obsedoj formas inter ni barilon, kaj lin kolerigas.

Mi demandas min, kial mi timas ami; kvankam mi scias ke ĝi venkas ĉion, ĝi estas tio kion la mondo bezonas. Estas saĝe dirite, ke se homoj ĉie povus malliberigi la amon en si, ĉiuj samtempe, ni povus ŝanĝi la mondon en unu horo.

Estas domaĝe, ke mi similas komputoron. Mi opinias, ke mi simbolas ĉi tiun teĥnologian epokon - malvarma, efika kaj nehoma. Mi estas stultulino.

Jen denove Nelsono. Li ridetas kaj mi sidas ĉi tie kiel bela peco de sunblankigita ligno. Kial mi ne povas reciproke rideti? Provu! Povas esti, ke vi ekmoliĝos kaj burĝonados. Povas esti, ke via tago ankoraŭ alvenos!

Trad. Audrey Childs-Mee (odri ĉajldz mi) ♀,  
Nederlando

---

### DENOVE TIU TEMO!

Jes, vi divenis: KVA denove organizas kurson pri publika parolado por virinoj. Ĝi baziĝas sur la materialo jam sukcese uzita en Pisanica (vidu la lastan numeron de SkE), kaj okazos dum la Universala Kongreso en Aŭgsburgo. La kurso enhavos la jenajn sekciojn: kiel prezentiĝi antaŭ publiko, kaj kiel kunmeti paroladeton. Sed, plej grave: la kursanoj mem devos verki kaj prezenti mallongan paroladon al la aliaj partoprenantoj. Atentu, ke eblos akcepti nur limigitan nombron da partoprenantoj.

---

# Antaŭen kaj...

## KONFERENCO EN NAJROBO

La Monda Konferenco de UN pri virinoj okazos ĉi-somere en Najrobo je 15-26 julio. Ĝi rerigardos kaj taksos la atingojn de la Jardeko de UN por Virinoj 1976-1985.

La du ĉefaj temoj de la konferenco estos jenaj: ekzameni la efektivigon de la celoj de la Jardeko por Virinoj; strategioj por realigi la celojn de "egal-eco, evoluo kaj paco". Kiel ĉe la antaŭa konferenco en Kopenhago, proksimume samtempe okazos libera Forumo por ne-registaraj organizaĵoj, je 11-19 julio. Ankaŭ UEA ricevis inviton partopreni kaj planas sendi reprezentanton.

## NEŬTRA VIRGENRO

Laŭ la Franca Akademio, kiu strebas protekti la purecon de la franca lingvo, la vira genro estas la "neŭtra" genro en la franca. La Akademio havas 40 membrojn, el kiuj unu estas virino.

La Akademio maltrankviliĝis post la starigo de Terminologia Komitato de la Ministerio por Virinaj Rajtoj. Ĝi timas la planajn enkonduki in-genrajn formojn de titoloj kaj oficoj, ĉar ĝi opinias, ke tio fontas el miskompreno pri la koncepto de gramatika genro, kaj ke ĝi kontraŭas la esencon de la lingvo.

La prezidanto de la Terminologia

Komitato, Benofite Groult (b'nŭat grul) Ŝ, respondas: "Lingvo ne estas neŭtrala ilo. Fakte, ĝi spegulas la antaŭjuĝojn kaj strukturojn de la socio. Ju pli virinoj altiĝas sur la socia ŝtuparo, kiu kutime paralelas la salajran ŝtuparon, des pli oni rifuzas doni al ili in-genrajn titolojn."

## SOLAJ VIRINOJ EN LA TRIA MONDO

Pro ekonomiaj kaj sociaj ŝanĝoj en la Tria Mondo, difinita grupo suferas nekredeblan mizeron. Temas pri solaj virinoj: forlasitaj edzinoj, vidvinoj, eks-edzinoj kaj needziniĝintaj patrinoj. Ili luktas kontraŭ teruraj handikapo por prizorgi siajn infanojn kaj gajni monon por la familio.

La Internacia Labor-Organizaĵo ĵus aperigis studon pri tiu grupo, kaj avertas ke la planistoj de evolupolitiko finfine devos okupiĝi pri ĝi. Ne sufiĉas fidi je la estontaj avantaĝoj, kiujn portos al ili la ĝenerala evolupolitiko nur post multaj jaroj.

Nova politiko necesas pro la jenaj kialoj:

- En multaj evolulandoj almenaŭ tri familioj el dek dependas de virino. Tio verŝajne estas subtakso.

- Virinoj suferas multajn praktikajn malhelpojn, pro vircentraj sociaj strukturoj kaj malebleco profiti de edukado, trejnado, financa helpo, teknologio kaj aliaj rimedoj.

- La plimulto da familioj, estrataj de virinoj, estas tre malriĉaj; inverse, grandega proporcio da malriĉaj familioj

dependas de virino. La infanoj de tiaj familioj riskas heredi la malavantaĝojn de la patrino.

La studo emfazas la neceson re-rigardi la evolupolitikon kaj aktive favori la milionojn da koncernatoj. Jam ekzistas politikoj por malriĉaj kamparanoj kaj malriĉaj familioj ĝenerale. Sed necesas ankaŭ aparte konsideri patrinojn kaj famiilestrinojn. La raporto konkludas, ke multaj virinoj estas ne nur patrinoj, sed ankaŭ homoj, kiuj gajnas monon kaj subtenas familion. Same kiel viroj, ili bezonas profiti de skemoj por krei laboron kaj enspezojn.

#### INAJ RABENOJ

Post longega debatado, la estranta Rabena Asembleo de Konservema Judismo decidis akcepti virinojn kiel rabenojn. La asembleo konsistas el pli ol 1 100 rabenoj tra la tuta mondo.

La Ortodoksa juda movado retenas pli tradiciajn sintenojn ol la Konservemaj judoj, kaj forte kontraŭstaras la rabeniĝon de virinoj. La pli progresemaj judaj movadoj - la Reforma kaj Rekonstrua movadoj - jam akceptas virinojn kiel rabenojn de pli ol 10 jaroj, kaj ekzistas pli ol 80.

La unua Konservema rabenino rabeniĝas en majo.

#### DU VIRINOJ = UNU VIRON

En Pakistano oni akceptis novan leĝproponon, laŭ kiu la atesto de du virinoj egalas tiun de unu

viro. Tio validos en kazoj, kie atestantoj necesos por financaj dokumentoj.

Ankoraŭ sub debato estas alia leĝpropono, laŭ kiu la vivo de virino valoras nur duonon de vira vivo. En kazoj de ne-antaŭplanita murdo, la familio de la murdito rajtas peti kom-penson. Unu grupo postulas, ke la prezo por murdo de virino estu nur duono de tiu por viro.

Tiu leĝo ankoraŭ ne estas akceptita. Pakistanaj feministoj petas ĉiujn virinojn skribi protestleteron al: Prezidento Zia-ul-Haq, CMLA Sekretariato, Rawalpindi/Islamabado, Pakistano.

#### EŬROPA PARLAMENTO

Post la elektoj al la eŭropa parlamento en 1984, la procentaĵo de parlamentanoj estas 17,29%. Danlando havas la plej altan proporcion de reprezentantinoj (37,5%), kaj sekvas Nederlando kun 28%. La lando kun la plej malalta proporcio de parlamentanoj estas Grekujo (8,3%), sekvata de Italujo kun 9,8%.

La procentaĵo de kandidatinaj al la parlamento (kiuj ne nepre estis elektitaj), estis pli alta ol en la antaŭaj elektoj en 1979. Krome, la procentaĵo de kandidatinaj estis preskaŭ sama kiel la procentaĵo de virinoj, kiuj efektive estis elektitaj.

**...malantaŭen**

# PATRINECO KAJ PROFESIO:

## Ĉu la kombino eblas?

Tio estas demando, kiun ni starigis al pluraj legantinoj de SkE. Ni sendis al ili demandilon pri la problemoj rilate al prizorgado de infanoj, domtaskoj kaj ekstera laboro. En SkE n-ro 11, ni jam aperigis la respondojn de virinoj en Brazilo, Britujo, Estonujo, FR Germanujo, Hungarujo, Svedujo kaj Usono. En ĉi tiu numero aperas kelkaj el la ceteraj.

Kelkaj virinoj reagis al la demandilo per artikolo, aliaj rekte respondis la demandojn. En tiuj kazoj, ni ĝenerale rearanĝis iliajn respondojn en la formo de kontinua teksto, por faciligi la legadon.

### NEDERLANDO:

Kiam mi serioze faklaboris ekster la hejmo miaj gefiloj jam estis sufiĉe aĝaj por prizorgi sin, se mi mem ne jam revenis hejmen. Mi estis lerneja instruistino kaj miaj laborhoroj estis preskaŭ ĉiam samaj kiel tiuj de la gefiloj. Ili estis aparte komprenemaj kaj ne kaŭzis problemojn, kiuj malhelpus mian faklaboron. Se ili malsanis, mi foje devis peti forpermeson de mia lernejo, sed neniam dum longa tempo.

Komence ni loĝis en apartamento en la domo de miaj gepatroj. Tial, kvankam ni ne respondecigis la geavojn pri la genepoj, mi sciis, ke ĉiam estas iu en la domo. Poste ni transloĝiĝis al propra domo, sed, kiel dirite, la gefiloj jam kapablis zorgi pri si.

Unu komenton mi povas aldoni: mi ĉiam firme kredis, ke patrino de junaj infanoj, t.e. de infanoj sub la lerneja aĝo, devas sin dediĉi al ili. Kiam la lasta el ili jam vizitadas lernejon, ŝi povas eklabori ekster la hejmo. Tiun principon mi sekvis. Tamen mi, de iom da tempo, dubas ĉu mi pravus. Junaj infanoj bezonas la sekurecon de la patrina ĉeesto, sed, ĉu nepre la tutan tempon? Verŝajne pli grave estas,

La patrino konservu viglajn sian menson kaj sian vivo-  
ĝojon; se tiujn minacas la endoma vivo, la sklaveco de dom-  
mastrumado - kiu estas sklaveco nur se la dommastr(in)o  
vidas ĝin tia - ĉu ne pli saĝe, ke la patrino laboru ekster-  
dome, kondiĉe ke la infanoj estas taŭge vartataj, kaj revenu  
al ili kun plezuro? Aliflanke, tre postula faklaboro, kiu  
lacigas la patrinon, povus rezultigi, ke ŝi ne havas tempon  
pasigi kun la infanoj.

Ni havas ĉi tie geamikojn, kiuj baldaŭ naskos sian unuan  
bebon. Ĝi naskiĝos, antaŭvideble, en aprilo de la venonta  
jaro. La patrino estras hejmon por handikapuloj mense kaj  
fizike handikapitaj. Ŝi tre ŝatas sian laboron, kaj pro  
nedeziro ĉesi labori ŝi dum jaroj hezitis ĉu aŭ ne naski  
infanon. Finfine, tamen, ili ambaŭ decidis, ke jes. La  
patro laboras en oficejo kaj studas juron. Ili planas, ke  
post la semajnoj de oficiala foresto de sia laboro pro la  
nasko, la patrino ree eklaboros. La patro ĉesos labori kaj  
restos hejme por prizorgi la bebon kaj fari la dommastrum-  
adon - kaj studi. Mi suspektas, ke li ne plene komprenas  
kiom da laboro postulas eĉ novnaskito, kaj, se li tro  
"efike" organizos la beb-vartadon, mi timas, ke mankos la  
"am-etoso" ĉirkaŭ la infano.

Audrey Childs-Mee

#### NORVEGUJO:

Mi havas du plenkreskajn gefilojn. Profesie mi estas art-  
ŝtopistino. Tiu estas profesio, kiun mi povis praktiki  
ankaŭ hejme, do post la nasko de miaj infanoj mi daŭrigis ĝin  
hejme. Mi ne opinias, ke mia intenco fariĝi patrino influis  
mian sintenon al mia edukado aŭ laboro.

Mia edzo helpis min en la prizorgado de la infanoj, kaj ankaŭ  
en la domtaskoj. Li precipe purigis kaj faris pezajn taskojn.

De tiam, la situacio de gepatroj iom ŝanĝiĝis. Gepatroj  
hodiaŭ rajtas ricevi liberan tempon kiam infano malsanas.  
Oni rajtas elekti, kiu el la gepatroj prenu tiun forpermeson.  
Tio estas bona.

La provizado de infanvartejoj estas tute ne sufiĉa! Ne estas  
loko por ĉiuj, tamen la prizorgado de la infanoj estas tre  
kontentiga. Vartejoj estas multekostaj, sed oni povas laŭ  
bezono ricevi senpagajn lokojn, pro komunuma subvencio.

Precipe sola patro aŭ patrino, aŭ malriĉaj gepatroj, ricevas tion. La plejmulto da vartejoj estas malfermitaj dum nur kvar horoj tage, kaj ili estas fermitaj dum la somero kiel la lernejoj. Tial ili ne kontentigas la bezonojn de profesiuloj.

Pepita de Caspary

#### POLLANDO:

Mi havas tri plenkreskajn gefilojn. Antaŭ ol mi naskis mi laboris en banko kaj poste mi daŭrigis en la sama posteno. Post la nasko de ĉiu infano mi havis tri-monatan liberan tempon.

Mi opinias, ke mia intenco fariĝi patrino influis mian sintenon al mia edukado kaj profesia laboro.

Mia edzo konstante helpadis ĉe la prizorgado de la infanoj, kaj kontrolis iliajn hejmtaskojn dum ili frekventis lernejon. Krome, li helpis kuiru, ordigi la loĝejon, lavi ktp.

Kiam miaj infanoj estis malgrandaj estis facile ricevi lokon en infanvartejo. (Nun la situacio malpliboniĝis.) Do miaj infanoj iris al la vartejo, kaj posttagmeze mia edzo prenis ilin hejmen. Kiam la infanoj estis malsanaj mi mem zorgis pri ili.

Mi ne spertis diskriminacion ĉe dunganto, pro tio ke mi havis infanojn. Sed mi ne povis, pro multaj okupoj hejme, elekti pli bonan postenon.

Nun mi vidis kelkajn ŝanĝojn en la situacio de kiam mi havis infanojn. Unu ŝanĝo estas negativa: la manko de lokoj en infanvartejoj. Pozitiva ŝanĝo estas tio, ke patrinoj nun havas la eblecon ricevi tri-jaran liberan tempon pro nasko.

#### SVEDUJO:

Mi havas du infanojn,  $1\frac{1}{2}$ - kaj  $3\frac{1}{2}$ -jarajn. Antaŭe mi laboris kun veterinaro, kiel bestflegistino.

Mi restis hejme dek monatojn pro la nasko de mia unua infano kaj 13 monatojn pro la nasko de la dua. Mi estus preferinta resti hejme pli longan tempon.



Mi daŭrigis en la sama posteno post mia unua infano, sed mi laboris nur 24 horojn semajne kompare kun 40 antaŭe. Post mia dua infano mi ĉesis la laboron pro malkonsento kun mia dunganto. Mi aliĝis al sindikato kaj tio ne plaĉis al li. Subite ni ne konsentis pri diversaj aferoj.

Mi nun laboras dum la someroj por agrikultura komisiono. Oni faras statistikon por scii kiom da agrikulturaj produkt-aĵoj estas kulturitaj ĉiujare en Svedio.

Mi estis edziniĝinta kiam mi naskis miajn infanojn. Mia edzo havas du infanojn de antaŭa edziĝo. Ili ne loĝas ĉe ni sed ofte vizitas nin dum semajnfinoj kaj lernejaj ferioj.

Mi prizorgas la infanojn pli ol mia edzo, sed li helpas. Li manĝigas ilin dum tagmanĝo kaj enlitigas unu el la du. Li ne multe partoprenas en la domtaskoj nun. Multe dependas de tio, ke ni loĝas en la kamparo. Li ofte havas multon por fari ekstere kiam li venas de sia laboro.

Ni ne havas sufiĉe da infanvartejoj, precipe ne por tiuj, kiuj laboras malpli ol 21 horojn semajne. En tiu kazo, ne estas permesate lasi la infanojn en vartejo.

La vartejoj estas ĝenerale kontentigaj. Antaŭe la prezo de la vartejo dependis de la salajro, sed nun tio ŝanĝiĝis en mia komunumo kaj ĉiuj pagas same. La horoj estas taŭgaj dum la semajno, sed estas problemo por tiuj, kiuj devas labori dum la semajnfino. Tiam ili ne povas lasi siajn infanojn. Ankaŭ dum la someraj ferioj povas esti problemoj. Kiam mi laboris 24 horojn semajne kaj havis nur unu infanon, mi lasis ŝin en komunuma vartejo, bona kaj sufiĉe malmultekosta. Nun mi laboras malpli ol 21 horojn kaj ne rajtas lasi la infanojn tie. Anstataŭe mi uzas privatan vartejon. Kiam la infanoj estas malsanaj mi devas resti hejme.

Mi ne pensis pri patrineco kiam mi planis miajn edukadon kaj laboron. Sed nun, la fakto ke mi havas infanojn tre influas mian elekton de laboro. Mi ne povas labori la tutan tagon ĉar mi havas multon por fari hejme. (Ni havas kelkajn bestojn.) Estas ofte malfacile ricevi duontagan laboron.

Mi vere spertis diskriminacian sintenon ĉe dunganto pro tio, ke mi havas infanojn. Mi fakte ĉesis mian laboron en veterinaro hospitalo post mia dua infano ĉar ni ne plu interkonsentis. Mi ofte sentis kulpon kiam la infanoj estis

malsanaj. Ĉiam urĝis preni la infanojn post la laboro kaj kelkfoje mi ne povis resti pli longan tempon en la laborejo kiam estis multe por fari.

Marianne Nilsson

---



Mirdza Burgmeister ♀, Latvujo

Populara en Latvio fariĝis la informfilmo Mi serĉas la viron, kiu tuŝas problemojn pri familia vivo ĝenerale kaj samtempe serĉas respondon al la demando, kial en Latvio kreskas la nombro de needziĝintaj viroj. Oni aldonu, ke rilate nuligitajn edzecojn Latvio okupas la unuan lokon en Sovetio.

Antaŭ kelkaj jaroj oni montris informfilmon Virino, kiun (kian) oni atendas? La konkludo: virinoj fariĝis pli kaj pli virecaj (laŭ vestoj kaj okupataj oficoj) kaj viroj, male, virinecaj (okupiĝas pri infanvartado, mastrumas en kuirejo, hejme k.s.), tamen dank' al Dio, robojn ankoraŭ ne portadas.

Tiu ĉi filmo pensigis la socion, ke virinoj devus resti unuavice virinoj. Almenaŭ ili evitu la pezajn fizikajn laborojn (kiuj difektas ilian sanon), ekzemple tiuj de traktoristo, konstruaĵlaboristo k.a. Bedaŭrinde en realo ĝis nun nenio ŝanĝiĝis.

La nova latva dokumenta filmo ne estas la daŭrigo de la unua, sed tute memstara. La aŭtoroj de la filmo montras nuntempan viron en la ĉiutaga vivo, liajn ecojn, okupojn, emojn, karakteron ktp. Oni vidas drinkulon dormantan sur benko apud strato, viron kiu gaje pasigas la tempon en amuz-

---

vespero, sed ne edziĝas, ĉar li preferas "ŝanĝi" la virinojn. Krom tio ĉiujn hejmajn laborojn li scipovas fari mem. Instruisto kun altkvalitaj moralaj ecoj, sed ordinaraspekta, sensukcese serĉas edzinon helpe de geedziĝanoncoj. Post la morto de la edzino la vidvo okupiĝas pri tri infanoj: li lavas tolaĵojn, kuiras, purigas loĝejon kaj ĉiumatene akompanas la etulojn al infanĝardeno. Oni povas vidi ankaŭ familiojn, kiuj trovis eblecon pligrandigi la enspezojn havante propran flor- kaj legom-ĝardenon, ĉar la salajro ne sufiĉas por vivteni la familion.

Respondon al ĉiuj tiuj problemoj la filmo ne donas. Estas klare, ke venis tempo ion ŝanĝi en la ekzistantaj vivkondiĉoj, se oni volas por estonto havi normalajn familiajn rilatojn kaj eduki fizike kaj morale fortajn civitanojn.

---

## ĈU DISKRIMINACIO?

Permesu al mi ektuŝi la temon pri virina diskriminacio en Esperantujo.

En Vankuvero pendis nekutima murtapiŝo sur muro de la libro-servo. Pri la kongreso mem mi legis multnombrajn raportojn en diversaj Esperanto-revuoj el la tuta mondo, sed eĉ ne unu vorton pri la brodita tapiŝo.

La murtapiŝon brodis virinoj el 14 landoj el kvar kontinentoj laŭ instigo de esperantistinoj el pacifika marbordo. Jam la anoncon de tiu iniciato plejparte ne publikigis la Esperanto-revuoj. Oni legas en gazetoj pri flankaj temoj; kial oni ne menciis internacian virinan realigon de brodaĵo, ĉefe kiam ĝi estas prezentita en Universala Kongreso? Por kunordigi ĉiujn detalojn de la murtapiŝo virinoj uzis la internacian lingvon; kial silentis pri ĝi ĉiuj raportintoj pri la kongreso, kiuj cetere ne neglektis informi la esperantistaron pri kelkaj mankoj.

Ĉu seksa diskriminacio? Mi respondas JES! Ĝi eble estas nekonscia fare de viroj, kiuj estas edukitaj neglekti multnombrajn virinajn aferojn. Estas nia tasko ĝin denunci senĉese en Esperantujo.

Louise Marin (luiz mare) ♀,  
Francujo

---

# La seksa lingvoproblemo

Claude Piron (klod piro) ♂,  
Svislando

Vi demandas pri mia opinio koncerne la seksan lingvoproblemon, aŭ la lingvan seksoproblemon en Esperanto.

Nu, mi konstatas, ke mia pozicio ŝanĝiĝas de tempo al tempo tiurilate, sen konduki min al vere kontentiga solvo, kio konfirmas, ke ĝi vere estas tre delikata kaj malsimpla. Tiu komplekseco devenas de tri kaŭzoj:

- (1) lingvon oni ne povas perforti: ĝi evoluas, sed nature kaj malrapide;
- (2) lingvo devas esti kohera; kelkfoje oni imagas, ke oni ŝanĝos nur parton, sed fakte tiu ŝanĝeto modifas la ekvilibron de la tuto kaj postulas ŝanĝojn pli fundamentajn ol oni imagis;
- (3) ĉio, kio rilatas al la diferenco inter seksoj, tuŝas tre profundajn tavolojn en nia psiko, eĉ se ni tion ne konscias; tial ni ofte reagas pli intense ol la vera, konvencia lingvoproblemo pravigus.

## La pronomoj

Dum longa tempo, mi favoris la ideon uzi ĝi kiam oni ne speciale deziras precizigi sekson: la homo, ĝi... la sekretario, ĝi....

Sed nun - eble mi refoje ŝanĝiĝos, mi ne scias - mi sentas tiun uzadon senpersoniga, malpersoniga, objektiga, kaj sekve, iagrade, malplivaloriga.

El ĉiuj proponitaj pronomoj (kun la signifo li aŭ ŝi), plej plaĉas al mi zi. Sed mi dubas, ĉu ĝi povos enradikiĝi. Pronomo estas io tiel baza en lingvo, ke nur tre malfacile oni povas sukcese enkonduki novan en vivantan lingvon; zi verŝajne aspektos tro artefarite al la plimulto.

---

Finfine, eble la solvo kuŝos en reveno al la tradicia sistemo. Por tion atingi, necesas nur, ke oni rigardu la problemon laŭ alia perspektivo. Kiam la virinoj komprenos, ke la sistemo malfavoras la virojn, eble ili akceptos tiun proponon. Sed por tio necesus revortigi la regulon jene:

Ekzistas en Esperanto pronomo, kiu signas la homon, ĝenerale, kiu ajn la sekso. Tiu pronomo estas li.

Se oni deziras precizigi, ke temas pri virino, oni uzas specialan pronomon: ŝi.

La kompatindaj viroj ne ricevis specifan pronomon. Manke de tiu distingo, oni uzas pri ili la ĝeneralan pronomon li.

Pruvon, ke la pronomo li estas senseksa, mi trovas en la fakto, ke la Biblia Societo Londona alprenis tiun pronomon por signi Dion kaj la anĝelojn. Pri la fakto, ke Dio ne estas pli vira ol ina, ĉiuj teologoj konsentas: Dio estas senseksa estaĵo. Kaj se vi volas diskuti pri la sekso de la anĝeloj, nu, bone konsentite, sed alifoje, mi petas.

### La sufiksoj

Ni nun konsideru la afikson, kiu montras, ke oni specife parolas pri la vira sekso. Ĉe bestoj, ni uzas la prefikson vir-, sufiĉe kontentige: virkato, virhundo, virĉevalo ... Sed tio ne povas taŭgi por homoj: viredukisto aŭ virflegisto povus kompreniĝi kiel ajnaseksaj homoj okupiĝantaj pri la edukado aŭ flegado de viroj.

Zamenhof mem, kaj post li Petro Stojan, proponis la sufikson -ir-. Mi ne trovas ĝin taŭga, unuflanke ĉar ir- jam estas ofte uzata radiko, aliflanke ĉar la vokalo estas la sama kiel en -in-, kaj lingvo estas des pli klara, ju pli la diferencigoj montriĝas vokale. Ĉe radio, telefono, fonbruo, oni perceptas la vokalojn multe pli bone ol la konsonantojn.

Pro tiu sama kaŭzo mi forĵetus la sugestojn uzi -iĉ- kaj -im-. Ĉi-lasta, precipe, estas vere tro facile konfuzebila kun -in-. Se vi diros instruistimo, kiom da personoj en via aŭdantaro vere perceptos, ke vi diras tion kaj ne instruistino?

Oni ankaŭ proponis -aŭ-. Estetike, tiu ne plaĉas al mi: instruistabo ne sentigaŝ kiel homo, viro. Tio kompreneble, estas plej subjektiva reago, kaj ĝi havus validecon nur, se

multaj personoj reagas subjektive simile al mi. Sed estas alia argumento kontraŭ ĝi, nome, ke oni (i.a. nia terminologo R. Eichholz (ajŝholc)) proponis la sufikson -ab- por diversaj materiaj aferoj, ekzemple necesabo. Tiu formo estis prezentita en la Slipara Vortaro kaj en la projekto de Esperanta Bildvortaro (Duden)+.

Ne eblas scii, ĉu -ab-, kiel sufikso por sanitaraĵoj, enradikiĝos aŭ ne en la lingvo, sed ni almenaŭ devas respekti la principon, ke oni ne proponu du samformajn afiksojn por du tute malsamaj signifoj. Tial, miaopinie, -ab- signifanta viran sekson, estas forĵetinda.

Ŝajnas, ke, nuntempe, la lingva kreemo de esperantistoj manifestiĝas per tio, ke ĉiu proponas novan sufikson por havigi al la kompatindaj viroj tiun etan aldonaĵon, kiu, laŭ la lingvosento de multaj, ankoraŭ mankas al ili. Se ĉiuj ludas tiun ludon, kial ne ankaŭ mi?

Mi pli ŝatas pruntojn, lingve, ol arbitrajn elpenzaĵojn. Tial mi submetas al vi mian proponon, rekte tiritan el la latina: -us-.

Ĉu ne sonas bele la paroj katuso/katino, soldatuso/soldatino, cervuso/cervino, diuso/diino, sklavuso/sklavino? Mi koncedas, ke instruistuso kaj prezidentuso estas malpli belaj, sed sekretariuso estas oreplaa, ĉu ne?

---

+ La ideo ĉerpi elementon de vorto, kaj ĝeneraligi ĝian uzadon, estas filologie ĝusta. Eichholz diserigis lavabo, registritan en PIV, kvazaŭ ĝin formus la morfemoj lav, ab kaj o. Bernard Golden forte kritikis tiun sistemon en la n-ro 21 de la revuo Filologo, sed miaopinie ĝi estas valida. La fakto ke -abo devenas de latina verba finaĵo ne ĝenas. La vorto buso, unu el la plej internaciaj en la mondo, venas de la finaĵo -ibus en omnibus, plurala dativo de omnis, "ĉiu". Omnibus, latine, signifas "al ĉiuj", "ĉe ĉiuj", kaj oni uzis la vorton por signi trajnon, kiu haltas ĉe ĉiuj stacioj. La fakto, ke bus estis origine gramatikaĵo ne malhelpis ĝian fekundecon kun tute alia senco en omnibuso, aŭtobuso, trolebuso, ktp. Simile, aŭto, kiu greke estas kvazaŭ gramatikaĵo (ĝi estas la pronomo "si") transiris de automobile ("mem-moviĝanta") al aŭtobuso, aŭtoŝoseo, kaj, ekzemple, al la eŭropkontinenta autostop.

---

Ĉble vi riproĉos, ke -us jam ekzistas kiel kondicionala verba finaĵo. Sed finaĵoj neniam estas memstaraj vortoj aŭ radikoj en Esperanto. La fakto ke ni akuzative multe uzas -on ne malhelpas nin uzi la sufikson -on- en duono kaj triono.

Sed kiom ajn mi sentas patran korinklinon al mia useto, tamen mi kredas, ke la problemo estas neĝuste rigardata en tiu serĉo al vira afikso (almenaŭ en la ĉiutaga lingvo; eble por zoologoj la afero aperas alia).

Mi do persone proponas solvi ĝin per apliko de jenaj reguloj, kiuj nur estas konstato de jama parta uzado (ĉefe en Ekstrema Oriento, en anglalingvaj landoj kaj en Skandinavio, ŝajnas al mi):

(1) Por ĉiuj vortoj, kiuj esprimas rolon aŭ funkcion (escepte de nobela aŭ familia), en socio aŭ societo (do inkluzive de profesioj), la o-formo aplikiĝas egale al viroj kaj al virinoj: instruisto, prezidanto, delegito, kuracisto, geografo, sekretario, flegisto povas esti viro aŭ virino.

La lingvo ĉi-rilate rezignas esprimi la seksdistingon, ĉar tiu estas tute flanka konsidero rilate al la koncepto, kiun oni volas esprimi. Jes ja, oficestro povas rilati malsame al vira sekretario ol al virina, kaj por knabeto ne estas indiferente, ĉu prizorgas la klason viro aŭ virino. Sed same, ne estas indiferente, ĉu la persono, kun kiu ni interagas, estas juna aŭ maljuna, bela aŭ malbela, sana aŭ malsana, ktp, tamen, ni ne enplektas tiujn flankajn ecojn en lingvoformojn.

Se oni nepre volas aŭ devas distingi la sekson, oni almetu la vorton vira aŭ la sufikson -ino. Vira flegisto perfekte respondas al la angla esprimo male nurse; flegistino uziĝus nur, se oni volas eviti dubon pri la sekso ĉe la aŭdanto aŭ leganto.

(2) Por nobelaj titoloj, oni distingu la seksojn laŭ la tradicia sistemo. Ili ja apartenas al reakcia pasinteco, ĉu ne? Ni do diru grafino, dukinino, princino, ktp.

Pri reĝino/reĝo, mi proponas distingi, ĉu temas pri reĝedzino, kiun mi emus nomi reĝino, ĉu pri virino havanta la samajn ŝtatajn funkciojn kiel reĝo, kiun mi nomus, plej ofte, reĝo. Laŭ tiu sistemo, ni povus diri, ke la belgoj havas reĝinon,

dum la britoj havas virinan reĝon. Sed eble ĉi tio estas psikologie malĝusta. Eble reĝino, en realo kiel en fabeloj, tro elvokas specon de patrino aŭ diino, por ke la homoj akceptu nomi ŝin reĝo. Estus interese scii, tiurilate, kiel reagus al mia propono la homoj en landoj, kie nun reĝas virino.

(3) Por membroj de familio, ni same konservu la tradician sistemon: frato, patro, edzo estu nur viroj; familianojn oni nomu patrino, fratino, edzino, ktp.

Oni povus konsideri, ke sistemo, en kiu la vorto frato egale aplikigu al (viraj) fratoj kaj al fratinoj, estus pli kontentiga, se oni samtempe alprenus virseksan afikson (fratuso/fratino; fratiĉo/fratino...), sed tio ŝajnas al mi tro teoria. Tiuj vortoj estas tro bazaj por povi enradikiĝi en la lingvo kun tute alia senco ol la tradicia.

Apud tiu lingva argumento, mi submetu psikologian: frato, patro, edzo, eĉ onklo elvokas multe pli forte la koncernan sekson ol instruisto aŭ prezidanto, ĉar temas pri pli profunda, pli primitiva tipo de rilatoj, kiu datiĝas de la infaneco kaj kiu estas ligita al la kompreno, ke tiu eco - la sekso de tiu grava persono - estas definitiva, neŝanĝebla. Alivorte, oni ne estas definitive instruisto aŭ prezidanto, sed oni estas definitive frato, filo aŭ patrino, kaj en tiuj rilatoj, kiuj havas tre primitivajn radikojn, la sekso de la persono estas multe pli grava ol kiam temas pri simpla funkcio.

(4) Kelkaj aliaj vortoj, ekzemple amiko, starigas malfacilan problemon. Por ĉino aŭ anglalingvano, ĝi tre facile povus signifi "vira amiko" kaj/aŭ "amikino", sed mi dubas, ĉu la aliaj popoloj povas tion akcepti senprobleme.

Konklude mi ripetu, ke la problemoj estas tre kompleksa. Oni ne solvos ĝin per racia decido, ĉar ĝi tro tuŝas la neraciajn aspektojn de sinesprimado. Uzante la lingvaĵon de lingvistoj mi dirus, ke ne temas nur pri "denotacia"<sup>+</sup> problemoj, sed pri problemoj, en kiu la "konotaciaj" elementoj estas tro gravaj, por ke arbitra decido povu ĝin solvi.

---

<sup>+</sup> Denotacio: Simpla signifo de vorto, sen implicoj  
Konotacio: Subkomprenata kromsignifo